# LE INFORMILO

Interkontaktilo por la F.L.E.-distrikto FLANDRIO
Numero 2 1950 Marto-Aprilo

## ANTAŬEN ! ! !

Jen kuŝas antaŭ vi la dua numero de nia Bulteno.
Kiel la antaŭa ĝi estas sendata al la Sekretarioj de la Sekcioj, kiuj estas petataj ĝin pluen sendi al ĉiu opa membro.
Tiu-ĉi aranĝo estas la plej malmultekosta, sed evidente postulas iom da laboro de la sekretarioj.
Al la demando ĉu vi deziras ke la Bulteno daŭrigu sian regulan aperon, la respondo nepre estas jes !
Sed por ke tiu fakto efektiviĝu, almenaŭ du gravaj kondiĉoj estas plenumendaj.
La unua estas ke ĉiu grupo ensendu monate kaj regule siajn sciindaĵojn al la redakcia adreso por ke nia tuta Distrikto estu informata pri la vivo de ĉiu grupo aparte.
Tiuj sciigoj devas servi ne nur kiel informo, sed ili ĉefe estu instigiloj al pli vigla laboro, por tiuj sekcioj kiuj lastatempe iomete laciĝis.
La dua kondiĉo rilatas al la "nervo de la milito", al la financoj. Presigi bultenon kostas monon, kaj ni nur disponas pri la financaj rimedoj kiuj niaj membroj disponigas al ni. Estas ankoraŭ kasistoj kiuj ne pagis la kotizon de la antaŭa jaro !
Ni faras varman alvokon al ili por ke ili tuj faru sian devon.
Karaj kamaradoj, multaj el vi jam de longe plendis ke nia Distrikto ne estis sufiĉe vigla, ke ne ekzistis inter ni la necesan ligilon, ke ni vidis unu la alian nur en tre malofta kunveno.
Kaj nun sindonaj kamaradoj prenis sur sin la memelektitan taskon regule aperigi la Bultenon kiu estu la viva signo de nia obstino, tamen kaj malgraŭ ĉio daŭrigi la sanktan batalon.
Helpu do , vi , tiuj kamaradoj.
Varbu novajn membrojn en via sekcio, organizu novajn kursojn, aranĝu kunvenojn kie vi parolu pri nia kara movado, organizu ekspoziciojn al kiuj vi invitu kaj altiru ĉiujn kiujn ni devas ankoraŭ konvinki.
Propagandu ĉiumaniere kaj ĉiuloke ! Profitu la grandajn festojn kaj propagandajn okazantaĵojn de la politika kaj laborista movado por konatigi niajn aspirojn kaj nian celon !
Unu laboristaro !
Unu lingvo, - Esperanto .
Antaŭen !

GAZETARSERVO : Esperanto ĉe la Instruado.

En Oruro ( Bolivio ) stariĝis popola altlernejo al kiu partoprenas 70 laboristoj. Esperanto devige estas instruata.

En la monaĥineja-altlernejo (Milwaukee - N.Ameriko) 50 instruistinoj kaj monaĥinoj lernas esperanton.

La fakorganinzaĵo de amerikaj instruistoj disdonis antaŭ kelke da monatoj broŝuron titolitan " The World Interlanguage ". La unua eldono de 20.000 ekzempleroj tiel rapide estis elĉerpita ke jam dua eldono de 20.000 ekz. presiĝis. Baldaŭ tria eldono sekvos.

Sinjoro Magnus Jacobsen, instruisto ĉe oficiala lernejo por knaboj (Aarhus-Danio) demandis kaj ricevis permeson instrui en la 7a klaso, esperanton anstataŭ anglan lingvon.
Antaŭ ol jaro forpasis direktoro de la oficiala instruado ĉeestis lecionon.
Li estis ege surprizita konstatante la progreson de la lernantoj. Li tre laŭdis la rezultatojn kaj diris ke tiu eksperimento ankoraŭ okazus.

La direktoro de la instruinspektado sendis cirkuleron al ĉiuj lernejodirekcioj por favori esperanton. Oni devas organizi kurson por la instruistoj.

. . . . . .

D-ro A.Fingerle urba-lernejarestro sendis cirkuleron al al urbaj lernejoj instiganta ke ĉiuj instruistoj sekvu tiun esperantokurson.

. . . . . .

DISTRIKTAJ SCIIGOJ.

Se, parolanta kompare, la aktiveco ĉi loke ne estas tre granda, aliloke la semitaj grenoj ekĝermas rapide kaj la movado, pli dense ol antaŭé, daŭrigas sian progresadon.

La sciigoj de nia gazetarservo pri la sukcesoj en Germanio, Japani kaj Sudameriko estas kvazaŭ oleo akceliganta la motorojn de la ĝenerala agemo. Ĉie propaganda laboro kaj alte takseblaj sukcesoj ! Ankaŭ ni estas influataj kaj stimulataj al pli fervora agado. Vere ni ankaŭ etendas la brakojn kun alten ruligitaj ĉemizmanikoj kaj ni eklaboras. Fakte oni eklaboris ĉar ĉiuj preparigaj paŝoj estas faritaj por fondi novan sekcion de nia laborista asocio.

La elektita loko estas Boom.

La distriktestraro, interkonsente kun la popola altlernejo "Instituut Emile Vandervelde", organizas publikan kunvenon la Dimanĉon 23an de Aprilo en la Popoldomo, Kol.Silvertopstraat, 13, Boom, je la 10a mateno. Al ĉiuj niaj gekamaradoj liberaj tiun tagon, ni urĝe petas ke ili grandigu la nombron de la ĉeestantoj.

Per speciala cirkulero, la malnovaj esperantistoj konataj, estas insiste petataj al ĉeesto kaj kunlaboro. La kunveno, kies celo estas la starigo de nova sekcio, devas esti por ni vera interkonaŭiĝa kaj fratiga kunveno. Pri la sukceso ne povas esti ia dubo.

La regiono estas tre fruktedona kampo kaj la najbaraj kaj laboremaj Willebroekanoj certe laŭpove helpos.

La nove kursofiniĝantaj lernantoj estas multpromesantaj adeptoj kaj promesis senesceptan aliĝon. Kun granda plezuro ni ekaŭdas pri la sukcesoj - sed multe pli kortuŝa estas propra sukceso kaj konstato ke la faritaj klopodoj ne estas vanaj.

Kontribuu al nia laboro kaj venu multnombre al Boom la 23an de Aprilo. - Tramo je la 9 h 10 ĉe Victorieplaats.

Mortiers.

. . . . . . .

Unua de Majo. - Grandantverpeno kolektive partoprenos en la manifestacio. Ĉiu grupo alportu sian flagon. Se eble la familianoj ekmarŝu kun ni.

. . . . . . .

GRUPA VIVO : Sekcio Deurne " Antaŭen ".

Raporto pri la jarkunveno de la 24a de februaro 1950a, sekvos en la proksima numero. Loko mankas.

. . . . . .

La kursoj baldaŭ finos. Ni povas esti kontentaj , ĉar la farita laboro ne estis vana.

En Deurne ni komencis malmultnombre, sed la lernantoj estas fervoraj kaj persistemaj ĉar ili ĉiuj sekvas ĝis nun.

En Wilrijk estas sukceso. 10 ĝis 12 komencantoj ankoraŭ sekvas la lecionoj de K-do Van Eynde. Mi esperas ke tiu kerno aliĝos al nia grupo, por ke en la baldaŭa estonteco, ili formu apartan grupon.

Laŭ la lasta novaĵo , kiun mi ricevis, deka da infanoj ankoraŭ sekvis la kurson de k-dino Toussaint.

Nur en Edegem la kurson forfalis. Nur ? lernantoj restis. Mi esperas ke ni retrovos ilin la proksiman jaron.

. . . . . . .

Nia grupo intencas okazigi pruvekzamenon por komencantoj kaj progresantoj, dum la monato Majo de tiu-ĉi jaro.

Ĉiuj kiuj lernis la 17 unuajn lecionojn el la komencanto povas partopreni. Ĉiu enskribanto ricevos la necesajn informojn .

Enskribu multnombre tiel baldaŭ kiel eble al jena adreso :
Bonte J. De Francqueslei 8 Deurne-N.

. . . . . . .

DISTRIKTA KOTIZO - La kasisto insistas por ke la kotizoj por la jaro 1949a estu pagataj senprokraste.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Redekteja adreso : R. Fontijn, Van Dornestraat 3, DEURNE(Antwerpen)

o o o o o o o o o o o o o o o o o o o o

# L.F. INFORMILO

Interkontaktilo por la F.L.L.-distrikto FLANDRIO

Numero 3 1950 Majo

SEKCIO DEURNE - ANTAŬEN

Raporto pri la jarkunveno de la 24a de februaro 1950a
Ĉeestis : 11 membroj.

Je la oka kaj duono la prezidanto malfermis la kunvenon, kaj dankis k-do Willekens pro lia ĉeesto.

La sekretario raportis pri la grupa laboro. La membraro stagnis. Ĉar de 29 anoj la antaŭa jarkunveno ni atingas nun la nombron 30 . Sed ni bone laboris la pasintan jaron. Ni organizis ekskursojn , ekspoziciojn, kursojn. Nia gazeto " Esperante " kaj la disitrikta gazeto aperis. La sekretario esperas ke ni daŭrigos en la enirinta vojo.

K-do Willekens respondis al la bonvenemaj vortoj de la prezidanto.Transdonis la salutojn de la distriktestraro kaj de la Antverpena grupo. Li gratulis Deurne pro ĝia agemeco.

Sekvis la raporto de nia kasisto, el kiu mi notis ke ni forvendis multajn librojn, insignojn, presaĵojn,kovertojn kaj 300 ekzemplerojn de "Esperanto wint veld" , sed ke ni ĉiam bezonas pli da mono.K-doj D'Haese kaj Spitaels kontrolos la librojn.

Ni ne aŭdis raporton pri nia gazeto ĉar k-do Fontyn ne povis ĉeesti.

K-do De Groof eksplikis ke grava manko estas nuligita, ĉar ek. de la starigo de la grupo estas la unua fojo ke ni enskribis la raportojn pri niaj kunvenojn.Kaj li legas la okazintaĵojn de nia grupo dum la lastoj monatoj. Tiu estis tre interesa. La prezidanto rimarkas ke la raportisto progresas kaj gratulas lin.

Intertempe k-do Van Hove alvenis.

La sekvonta punkto estis la elekto de la estraro. K-do Foquet kaj k-do Matheyssen longe diskutis.K-do Foquet volas interŝangi kun k-do Matheyssen la postenojn de prezidanto kaj vic-prezidanto.Sed post interveno de k-do Bonte , k-do Foquet restas prezidantonkaj k-do Matheyssen vic-prezidanton . Poste oni elektis K-do Bonte sekretarion.

Pro malsano k-do Walen volas transdoni la postenon de kasisto. Ĉar alia kandidato sin ne prezentis , li denove akceptis la postenon por kelkaj monatoj, kaj intertempe ni klopodos trovi iu kiu volos enkasigi la kotizojn ĉe la membroj, kiuj ne regule venis al la kunvenoj. Estis elektataj kiel konsilantoj : k-doj Braspenninck, Van Hove, Fontyn , Spitaels.

La prezidanto volus organizi ekzamenon por la membroj. Ni demandos al K-doj Willekens, Mortiers kaj Van Eynde kunhelpon por kerekti la taskojn.La komuniko pri la ekzameno kiu okazos eble en majo, aperos ankaŭ en la distrikta informilo por ke aliaj komencantoj povus partopreni. Ni demandos malgrandan sumon por la partopreno en la kostoj.

Diversaĵoj : Ni kuniros la dekunuan de marto al la "Poesje ".
Ni aĉetos 300 numerojn de la venonta eldono de "Esperanto wint veld".

Ĉar estis jam la deka la prezidanto fermis la kunvenon , kaj ni pritraktos la organisadon de ekskursoj kaj niaj regulaj vendredaj kunvenoj dum la venonta estrarkunveno.

. . . . . . . . . . . .

SEKCIO ANTVERPENO . - Pri nia biblioteko .

Por tiuj, kiuj finis la elementan esperantan kurson, kaj aliaj kiuj neniam havas sufiĉe da tempo por regule ĉeesti la grupvesperojn, la anverpena grupo posedas ampleksan bibliotekon je ilia dispono. Nu, por progresi en la lingvo, ne sufiĉas la studado de ĝia gramatiko. Tute ne. Necesas la pratikado, kiun oni akiras, krom en la grupvesperoj, ĉe la atenta legado de taŭgaj libroj de aŭtoroj famkonataj. Ĉar ne ĉiuj libroj estas taŭgaj laŭ lingva vidpunkto.

Precipe por tiuj, kiuj volas sin kapabligi en la lingvo estas bona konsilo, ke ili komencu per la legado de la libro de nia Majstro la "Fundamenta Krestomatio " kiu estas tre leginda laŭ stilo kaj lingvo. Tiu libro estas ĝis nun tro malmulte legata de niaj adeptoj . La biblioteko enhavas amason da libroj. Ekzemple de Privat, J.Baghy, Grabowsky kaj aliaj, ankaŭ ĝi posedas eĉ la lastajn eldonojn. Nomi ĉiujn titolojn estas superflua. La katalogo estas akirebla ĉe la bibliotekisto ĉiun lundon en nia sidejo.

La bibliotekisto.

. . . . . . . . . .

. . . . . . . . .

Enveninta letero .

La Esperanto Monumento sur Teksel Rekonstruita.

Gesamideanoj,

En la jaro 1935a estis fondata kaj inaŭgurata en la vilaĝo 'Den Burg, insulo Teksel, monumento honore al la rememoro de Dro. Zamenhof. Kiel fondinto de tiu monumento povas esti konsiderata Sro Jon.M.Duinker.Per liaj entuziasmo kaj elokventeco li en malpli ol unu jaro sukcesis akiri la monon,bezonatan por la konstruo.En 1941a la monumento estis mal konstruata ,ĉar nek ĝi,nek la rememoro al Dro. Zamenhof plaĉis al la komandanto de germana S.S.bataliono,kiu tiam, kiel neinvitita gastaro,troviĝis sur la konata insulo de birdoj.

En 1945a je la 6a de Aprilo dum la sanga batalo,kiu en tiu tago komenciĝis kaj iĝis konata kiel la Rusa-milito,(ĝi estis batalo inter ribelanta Georgia regimento kaj la germana armeo),Sro.Johan Duinker estis murdata de germanaj militistoj kune kun naŭ aliaj loĝantoj de Teksel.En tiu sama tago,la frato de Johan Duinker, Sro Gijsbert Duinker, tiel severe vundiĝis dum la bombardado de la vilaĝo Den Burg, ke li kelkajn semajnojn poste mortis pro tio.La fratoj Duinker estis entuziasmaj propagandistoj de Esperanto kaj per la Teksela gazeto,kies eldonistoj ili estis, ili faris multan propagandon por la disvastigado de la internacia lingvo.

Estas kompreneble, ke Sro Johan Duinker, kune kun aliaj preparis planojn por la rekonstruo de la monumento,ĉar ankaŭ li,same kiel la plimulto de la Nederlanda popolo vivis en la firmaj konvinko kaj espero,ke certa Adolf venkus sin morta.Feliĉe por ni,la tempo ne trompis tiun esperon, sed la fratoj Duinker ne vidis la tiom deziratan malvenkon de la naci-socialista banditaro kaj la rekonstruo de la monumento ne de ili povis esti realigata.

La planoj por la rekonstruo de la monumento tamen estis daŭrigata de aliaj kaj jam en Februaro 1946a la mono,bezonata por la rekunstruo estis kolektita per donacoj de Esperantistoj, amikoj de Esperanto,kaj la Teksela loĝantaro. Daŭris tamen ĝis la nuna jaro antaŭ ol estis akirata la permeso por la rekonstruo.

Sed nun ĝi okazos ! La konstrumaterialo jam alvenis kaj la masonistoj povas komenci. Estas la intenco de la rekonstrua komitato, ke la monumento estos reinaŭgurata je la 29a de Majo 1950a, la dua Pentekosta tago, posttagmeze je la tria horo. La insulo Teksel estas atingebla per vapor ŝipoj, veturantaj inter Den Helder kaj Teksel. Daŭro de la marvojaĝo 40 minutojn. Forveturo el Den Helder matene, je la deka horo kaj dudek minutoj, posttagmeze je la dektria horo. Reveturo el Teksel je la deksepa kaj duono.(Vidu ankaŭ la hortabelon de la Nederlandaj Fervojoj). La rekonstrua komitato invitas ĉiujn gesamideanojn kiuj havas intereson por la reinaŭgura solenaĵo, venu al Teksel en la supre nomita tago por ke la reinaŭguro iĝu manifestacio de Esperantista solidareco.

Matene je la 12a horo okazos kunveno de la Nord Holanda Esperanto klubo La Norda Stelo. Dum tiu kunveno estos montrata la filmo pri la konstruo de la monumento en 1935a kaj pri la ekskursoj, kiujn La Norda Stelo antaŭ la milito faris al Teksel.

Ni esperas ke la intereso de la Nederlanda Esperantistaro estos granda por tiu ĉi okazontaĵo kaj jam nun anticipe bonvenigas vin,

La Rekonstrua Komitato.

. . . . . . . . .

. . . . . . . .

Redakteja adreso :

R. Fontyn, Van Dornestraat 3 Deurne (Antwerpen)

o o o o o o o o o o o o o o o o o o o o o

# L.E. INFORMILO

Interkontaktilo por la F.L.E.-distrikto FLANDRIO

Numero 8 1951 Januaro

DISTRIKTA SCIIGO.

ATENTU : Al ĉiuj membroj: klopodu ĉeesti la distrikta kunveno,ĝi okazos en Deurne , la 12an de Januaro , je la 8a vespere en la salono "De Hertog" Herentalsebaan 251 Deurne. En via intereso, ĉeestu tiun kunvenon , agrabla surprizo vin atendos.

NEESTANTAJ MALPRAVAS.

Laŭ iniciativo de iuj kamaradoj okazis intergrupa kunveno en Wilrijk en la komenco de Novembro.

Temis pri provo krei intencan vivon, pli bonan interkontakton kaj interkonsentitan kunlaboradon.

La eksperimento plene sukcesis. La kunveno estis multope ĉeestata kaj kvankam, ne havante fiksitan tagordon , ĝi fariĝis vere interesa. Ne celante protokoli oni tamen ne povas ne substreki la veran interfratiĝan karakteron de la kunveno. Bonega animstato regis kaj montriĝis vera volo daŭrigi tiel kaj organizi similan kunvenon ĉiumonate.Ĉiu sekcio, laŭvice, gastigos la membrojn de ĉiuj regionaj grupoj. Kiel jam dirite ne estis tagordo kaj tamen regis ordo kaj ĝojo eĉ praktika laboro estis farita.

K-do Van Eynde animiĝis la vesperon. Pri la vivo en aliaj grupoj parolis koncernaj kamaradoj.

Antaŭ ol fini oni decidis kunveni en Hoboken komence de Decembro. Prezidanto jam estis elektita.

Ĉe la fino veran kaj varman revidon adiaŭis la ĉeestintoj.

En Hoboken, komence de Decembro, la ĉeestado estis ankoraŭ pli bona. Vere esperiga fenomeno ! La prezidanto, al kiu oni jam pliajn fojojn riproĉis paroli tro rapide ,ne tro uzis la cititan kvaliton malbonan.

Lia enkonduko estis mallonga, malrapida sed vigla. Li diris i.a. ke la novaj membroj,por kiuj similaj kunvenoj devas esti stimulantaj, vere devis eluzi la okazon, helpe de la malnovuloj, por fari la unuajn paŝojn sur la paroliga tereno.

La K-do Spitaels, kursgvidanto en Hoboken , tiam prizorgis al ni ion novan. Fantazie oni iris al kampejo kaj laŭvice li paroligis siajn lernantojn farante ĉiuspecajn demandojn. Per ĉi tiu paroliga ekzercado li plenigis grandon parton de la vespero.

Notinda fakto. - Rilate al la elektoj kiuj devis okazi du tagojn poste la salonoj estis okupitaj kaj la kunveno devis okazi en la kafejo mem. Feliĉe tiu ejo estas sufiĉe spaca kaj oni grupiĝis ĉirkaŭ du biljardoj en granda rondo. Tiel, en ĉiuj direktoj, oni vidis ridantajn vizaĝojn kun iom brilaj rigardoj.

Dum ni estis en plena kampado, kunveno partia finiĝis kaj la ĉeestintoj eniris la kafejon. Ili miris pri la babilado kaj silente aŭskultis. El nia rondo paro de haritonoj aŭdigis sian fortan voĉon por montri al la publiko ke oni eĉ flue povas paroli nian lingvon.

La sekvonta kunveno okazos en Deurne la 12an de Januaro 1951a. Fermante la kunsidon la prezidanto faris varman alvokon por ke nia proksima kunveno ankaŭ estus multnombre ĉeestata . Li dankis ĉiujn kaj gratulis k-don Spitaels por lia bonega iniciativo.

Ĉiuj ĉeestantoj promesis fari ĉion eblan por esti libera la 12an de Januaro.

Al tiuj kiuj ne povis ĉeesti ni adresas instigan alvokon de kunlaborado per ĉeesto de la kunveno kaj partopreno en la paroladoj.

Theo.

. . . . . . . . . . . . . .
. . . . . . . . . . . . .

Ofte okazis ke la redaktoro de nia "Informilo" ne ricevis enŝendaĵojn. Sed nun li estas tre feliĉa : oni sendis du artikolojn pri la sama kunveno. Li dankas la raportantojn. Jen sekvas la alia

RAPORTO PRI LA 2A INTERGRUPA KUNVENO EN HOBOKEN je dato 8-11-1950

---

Ĝi okazis en la agrabla "Popoldomo" Kapelstraat. Ĉeestis trideka da radiantaj gekamaradoj, novuloj kaj malnovuloj. Feliĉo ĉe malfeliĉo, la kunveno lokiĝis en la publika kafejo mem. Multaj trinkejvizitantoj direktis sian atenton al la fremdparolanta homcirklego ĉirkaŭ la du biljardoj.

K-do Mortiers funkciis kiel presidanto kaj per sonora voĉo bonvenigis la ĉeestantoj. Poste li donis la parolvicon al K-do Spitaels, kiu klarigis sian deziron partoprenigi la komencantoj en la interparolado dum tiu vespero. Li tial demandis al la gekamaradoj partopreni en imago ekskurson dum somera semajnfino al la ATB-domo kaj kampejo en Grobbendonck. Li klarigis ke en la grupo de Hoboken kie li esperantigas la naturamikanojn, li dum la antaŭaj lecionoj farigis ekzercojn en tiu senco.

Nun K-do Spitaels komencis demandadon al diversaj grupanoj dum kiam multaj novaj voĉoj aŭdiĝis. La spertuloj helpis se necesis kaj fariĝis amuza vespero sub signo de "La Naturamikoj".

Dum poste anoncita kampofajro la Hobokenanoj kantis akompanitaj de du muzikantoj, la facilan "Malriĉa fremda knabo". Ĉi tio ne fariĝis kiel povis, kaŭze de la ankoraŭ fremda medio . Dum la neekzistinta fajro brulis, estis okazo por rakonti vojaĝtravivaĵojn kaj komuniki Esperanto-okazontaĵojn.

Se preskaŭ estis tempo por disigi, ni kune ankoraŭ kantis "La Espero" kaj " Himno " . Dum tiu kantado ni ĉiuj sentis la bezonon ke ĉiuj eklerni kelkajn kantojn por kanti komune dum tiaj kunvenoj.

Estis tempo kaj la presidanto, kiu aŭdigis sian kantkapablon, elparolis nun la adiaŭajn vortojn, dum kiam li konfesis sian kontenton sin trovi inter tiom da gesamideanoj kaj vidi la realigon de nova laborista esperantomovado en nia regiono .

La sekvonta kunveno fiksiĝis por 12-1-51 en Deurne.
Ĉiu nepre ĉeestu !

E.Spitaels

. . . . . . . . . . . . . . .
. . . . . . . . . . . . . .

---

= AL NIAJ MEMBROJ : FELIĈAN NOVJARON =
= AL NIAJ GRUPOJ : PROSPERAN ESPERANTAN VIVON =

# N I   K A N T U ! !

## HIMNO

1.-Fratoj,al sun'libereco,
fratoj,nun supren al lum'!
./. Hel',el mallum'estinteco,
brilas estonto nin nun ! ./.

2.-Vidu la frataj milionoj
venas el nokto al ni,
./. Ĝis la scpir' de legionoj
turnos la sorton de ni. ./.

3.-Donu la manon nun, frato,
moku pri morto kaj fal'.
./. For la sklavec' kaj malsato!
Sankta la lasta batal'!..

4.-Rompu la jug'de l'tirano,
kiu turmentas vin .
./. Flirtu la sangruĝa flago,
Super la mond' svingu ĝi !

. . . . . . . . .

## ABIO VI, ABIO VI.

1.-./.Abio vi, abio vi,
kun foliar daŭrema ! ./.
Vi verdas ne nur en somer',
sed eĉ dum vintra neĝveter'!
Abio vi, abio vi,
kun daŭra foliaro.

2.-Abio jen, abio jen,
vi multe al mi plaĉas!./.
ho,kiel ofte ĝojis mi
ĉe la kristnaska bril'de vi
Abio jen, abio jen,
vi arbo plej amata !

3.-./.Abio vi, abio vi.
Jen via boninstruo : ./.
espero kaj la konstantec'
konservas forton de junec'!
Abio vi, abio vi,
vi scias nin instrui !

. . . . . . . . . .

## LA GAJA STUDENTO.

Jen studento antaŭ vi
Ju-kaj-da, ju-kaj-di
Ano de l' Akademi'
Ju-kaj-da,kaj-di
Esti juna kaj student'
Jen,plej gaja vivmoment'.
Ju kaj di-a-di-a-da
Ju kaj di, ju kaj da
Ju kaj di-a-di-a-da
Ju kaj di-a-da.

. . . . . . . .

## LA ESPERO

1.-En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion :
Al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

2.-Sub la sankta signo de l'espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj,
sed dissaltos la obstinaj baroj
per la sankta amo disbatitaj.

3.-Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela songo de l'homaro
por eterna ben'efektiviĝos.

. . . . . . . . . . .

## LA INTERNACIO.

Leviĝu en mizer'dronanta
Sklavar'malsata de la ter'!
Raci'nin vokas indignanta
Al mortbatalo pro liber'.
Malnovan mondon ni detruos
Ĝis fundament'de l'tirani',
Kaj nian novan ni konstruos:
Ne nuloj, ĉio estu ni !
Por finlukto socia,
Ni grupiĝu en rond'
Kaj la internacio
Triumfu en tutmond'!

. . . . . . . . .

## LIBERA LA PENS'

La penso de la hom'
Libera ja estas,
Samkiel fantom'
Kaŝita ĝi restas.
Gin hom' ne divenos,
Nek ĉirkaŭkatenos,
Do restas laŭ senc':
Ke libera la pens'!

. . . . . . . .

## REDONU MIAN MONON !

I

La kapitalistoj trans maro
La kapitalistoj ĉe ni,
La kapitalistoj nun ĉie
Rabadas la monon de mi.
Ĥoro :
Mian monon, ili redonu al mi,al mi;
Mian monon,ho! devos redoni al mi !

II

Ja tuta la laboristaro
En iu ajn parto de l'mond'
Suferas pro sama mizero :
Ĉu estas ne granda la hont'?

III

Batalu,amikoj trans maro!
Batalu,amikoj ĉe ni!
Por bono de l'laboristaro
Reprenu la monon por ni !

# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro
Antverpena. . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Redakcia adreso: Lamorinièrestraat 10 Antverpeno
Numero 10      1952      Januaro


---

AL NIAJ MEMBROJ KAJ LERNANTOJ : NIAJN PLEJ KORAJN DEZIROJN POR 1952a.

Fideluloj,

Ne povas esti ĉiutage sunbrila vetero loganta al promenado. Kontraŭe, nia klimato havigas al ni tre ofte tutalian veteron precipe dum la nuntempa sezono. Hodiaŭ ekzemple estas tia funebra vetero . Pluvo malvarma kaj vento tranĉanta ripete tamburadas surla fenestroj kaj atentigas, kvazaŭ aroge, pri la ekstera vetero. Ne rezisteble , eĉ iom tremetante, mi proksimigas seĝegon de la forno.

Ruĝo flave brulantaj langoj serpentume montriĝas tra la fornaj fenestroj. Pli bone ankoraŭ mi sentas la dolĉan komfortecon de sidloko apud forte brulanta fajro. Mi gustumas la varman teon kiel vera ekspertizisto/. Pipo kaj tabako kompletigas la intiman atmosferon de la hejmo.

Mi fumas kaj fumas forblovante la fumon kiu restas svebanta en la ĉambro. Ĝiaj diversaj formoj altiras mian atenton kaj senkonscie mi ekmiditas pri diversaj pasintaj aferoj. Ĉefe temas pri la esperanto-movado kaj la ĉiam revenanta demando. Kiom da malfideluloj (finlernantoj kaj membroj) forlasas la movadon kaj pro kio ? Kial nur tiom malmultaj uzadas praktike la lingvon restante en iu ajn grupo por ekzerci kaj perfektigi sin. Kial nur tiom malmultaj estas vere infektataj per la mikrobo de la " Interna Ideo" ?

Mi komprenas ke ne ĉiu relegiulo povas esti pelgrimo. Ne ĉiu militisto, ĝeneralo. Cetere mi supozas ke neniu finlernas xxxx nian lingvon nur pro scivolo ĉar tio signifas veran perdon da tempo kaj energio. Sed ni konstatas ke la nombro de tiuj kiuj persistas estas tro malgranda kompare al tiu de la forlasintoj. Estas tereno kiun ni nepre devas esplori laŭ ĉiuj aspektoj.

Same kiel multaj aliaj mi pripensas tiun fenomenon kaj suĉas sur la pipo sed solvon ne trovas. La problemon obsedas mian cerbon kaj subite, preskaŭ salte, mi stariĝas. Tra densa mallumo briletas la celo....Mi prenas mian kolekton de "Laboristaj Esperantistoj", trafoliumas kaj trovas.

Antaŭ mi; troviĝas la numero 7a de la nuna jaro. Patience kaj atente mi relegas la ĉefartikolon. Traktas pri la sama problemo. Konklude oni diras ke la kursofiniĝintoj ne ĉiam spertas la veran kaj efikan utilon de la lingvo kaj indiferentiĝas. kongresoj estus por ili la trafa kuracilo. Mi aprobas la enhaven ĉar ....

Ĉar mi memoras pri mi mem, ke estante ankoraŭ lernanto , instigite de alia kamarado, mi ĉeestis SAT-kongreson kiun partoprenis gekamaradoj el diversaj landoj. Dum tiu kongreso okazis tre gravaj diskutoj pri la spikologia aspekto kaj partia tendenco de la tiama laborista movado internacia. La paroladoj estis viglaj kaj entuziasmigaj. La interrompj abruptaj, akraj, flamaj kaj impetegaj.

Avidadmire mi observadis tiun ĝeneralan viglecon kaj atente mi sekvis la debatojn. Kompate mi komparis naciajn kongresojn kiujn mi ĉeestis en mia lando kaj dum kiuj tre ofte, pro la dulingveco, okazis interrompoj kaj miskomprenoj.

Mi revenis de la kongreso plene konvinkita pri la taŭgeco de nia lingvo kaj firme decidis daŭrigi la lernadon. Mi ekinteresiĝis pri la historio de la movado, la literatura trezoro.

Kiam mi parolas kun personoj kiuj ankaŭ ĉeestis internacian kongreson, ili ĉiuj parolas pri neforgeseblaj tagoj.

Resume, mi kredas ke estas nepre necese ke niaj novuloj ĉeestu internacian kongreson kiel eble plej baldaŭ. Ĉar la proksima kongreso de SAT okazos en Dusseldorf mi sugestas ke ni instigu niajn membrojn al partopreno. Dusseldorf ne estas tiom malproksima kaj la kostoj ne tiom altaj.

La funkciuloj de nia komitato eble trovos la rimedon por faciligi la aferon (ŝparkaso - informado - karavano).

Mi finas la fumadon

Pr.

. . . . . . . . . . . . . . . .
. . . . . . . . . . . . . . . .

PROTOKOLO PRI LA KOMITATA KUNVENO DE LA 12a DE NOVEMBRO(Bondsgebouw)

Ĉeestas : Kdoj Bonte, Bovoy, De Groof, De Bie, De Block, Mortiers, Van Lancker, Willekens.
Senkulpigis sin : Kdo Van Eynde

K-do Bonte sciigas ke li havas 11 novajn lernantojn en Deurne. Ĉe la naturamikoj sin prezentis 13 gelernantoj.

K-do Willekens post mallonga enkonduko diras ke oni antaŭ ĉio devas elekti la diversajn funkciulojn. Oni samtempe detale difinas ĉies taskon. La sekretario faros ĉiujn korespondaĵojn. La leteroj estos subskribitaj de li kaj la prezidanto. La 2a sekretario forsendos la bultenon kaj eventuale ankaŭ la kunvokilojn. La bibliotekisto ordigos la libroŝrankon kaj faros listoj publikigota per la bulteno. Li ankaŭ konstituos libro-stokon. La kasisto devas prizorgi ĉion kio rilatas la monan administradon kaj ankaŭ zorgos por leterpapero, kovertoj, kaj aliaj necesaj presaĵoj. La festorganizanto , helpata de gek-oj laŭ lia deziro, estos respondeca por la estontaj festoj. La gazetservanto esploros la diversajn gazetojn kaj havigos la utilajn informojn al la koncerna funkciulo. La ekspozicia fako kolektos ĉian konvenan materialon kaj uzos ĉiun okazon por montri ĝin, propagandcele, al la publiko.

La funkciuloj por la diversaj estrarpostenoj estas :

| | | | |
|---|---|---|---|
| Prezidanto | : Willekens | Festorganizanto | : De Block |
| Sekretario | : Bonte | Ekspozicia fako | : Van Lancker |
| Kasisto | : Bovoy | Gazet-servo | : Van Eynde |
| 2a sekretario | : De Groof | Protokoloj | : Mortiers |
| Bibliotekisto | : De Bie | | |

Fino iom post la 10a.

Pr.

. . . . . . . . . . . . . . .
. . . . . . . . . . . . .

DIVERSAJ SCIIGOJ.

La sekvonta kunveno por la Antverpenaj grupoj okazos la 15an de Januaro 1952a en Wilrijk , Heistraat. je la 20a .

. . . . . . . . .

Niaj grupoj kunvenas :

| | | | |
|---|---|---|---|
| Antwerpen | : Jaŭde, | je la 20a horo | - Lamorinièrestraat 10 |
| Deurne | : Vendrede, | je la 20a horo | - Herentalsebaan 251 " De Hertog" |
| Hoboken | : Marde , | je la 20a horo | - Heidestraat 246, ĉe Kdo Van den Wyngaert. |
| Merksem | : Lunde ; | je la 20a horo | - Bredabaan en Volksgebouw |
| Wilrijk | : Marde , | je la 20a horo | - Heistraat en Volksgebouw |

. . . . . . . . .

Dum la kunveno en Wilrijk, la SAT-anoj povos pagi la SAT kotizon al K-doj De Bie aŭ Mortiers.

. . . . . . . . .
. . . . . . . . .

# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro
Antverpena. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Redakcia adreso:Lamorinièrestraat 10 Antverpeno
Numero 14 1952 Majo

PROPAGANDO

La kamarado kiu la unua havis la oportunan ideon pri la alternaj kunvenoj en niaj diversaj sekcioj , estis vere feliĉe inspirita.

Depost jam kelka tempo ni ĉiu monate regule kunvenas je antaŭe interkonsentita vespero en la kunvenejo de unu el niaj grupoj, kaj tiel estis ke ni jam kelkfoje kunvenis laŭvice en Antverpeno, Deurne, Wilrijk, Hoboken, kaj la lastan monaton por la unua fojo post la milito en Merksem. Ni eĉ antaŭvidas ke en plej proksima estonteco ni kune iros al Schoten kie unu el niaj plej viglaj kamaradoj nun gvidas kurson por la Naturamikoj kiu brila sukcesas.

Ni estis precipe feliĉaj pri la kunveno en Merksem , kie ni havis plej laboreman grupon antaŭ la milito, sed kie kaŭze de malfeliĉaj cirkonstancoj la esperanta vivo restis stagnanta. Ni tre esperas ke tiu kunveno, kiu estis multnombre ĉeestata, estos instigilo por la tieaj kamaradoj por nova entuziasma laboro sur la esperanta kampo.

Pri tiuj-ĉi kunvenoj nia Informilo raportas per klara kaj konciza protokolo kaj oni do povas sperti ke la kamaradoj de la diversaj sekcioj ĉiam faras kiel eble plej por ke tiuj kunvenoj estu ĉu agrablaj, ĉu instruaj kaj ili ankaŭ estas, de tempo al tempo, laboraj.

Tiuj kunvenoj, kie nur esperanto estas parolata,estas vere kvazaŭ perfektigaj kursoj. Oni aŭdas mallongajn paroladojn de la kamaradoj el la diversaj sekcioj pri ĉiuj ajn temoj , la oreloj alkutimiĝas al la esperantaj sonoj kaj la kuraĝuloj inter la novuloj eĉ miksas siajn voĉojn en la esperanto diskutado;ĉar ni ne kuraĝas aserti ke ĉiu opa membro ankaŭ perfekte kapablas paroli la lingvon.

Ĉiu komenciĝo ja estas malfacila kaj la bona uzado de nia lingvo estas la rezulto de daŭra praktikado, de atenta studado kaj iom da obstina volo. ĉiuj nepraj kondiĉoj por tiuj kiuj deziras mastri la lingvon.

La praktikado kaj la legado de taŭga esperanta literaturo estas la du solaj elementoj, la nepraj kondiĉoj kiuj kondukas al la funda kono de esperanto.

Por la praktiko, ni invitas ĉiujn niajn membrojn al la regula ĉeestado de unue, siaj propraj grupaj kunvenoj kaj nepre la ĉiumembra, monata intergrupa kunveno,kie oni estas certa renkonti la kamaradojn de ĉiuj aliaj sekcioj kun kiuj oni povas interŝanĝi ideojn, precipe pri la propagando de nia movado.

Por la legado, niaj membroj sin turnu al la librolisto kiun ni publikigis en nia antaŭlasta Informilo.Ĝi enhavas plej legindajn librojn kiujn ni povas varme rekomendi kaj al kiu listo ni povus aldoni la plej lastajn aperintajn librojn se ekzistas sufiĉe da intereso.

Prez.

. . . . . . . . . . . . . . .
. . . . . . . . . . . . . . .

Protokolo pri la intergrupa monatkunveno de la 7a de Aprilo en Merksemo.

K-do Willekens malfermas la kunvenon, prezentante la prezidanton de la Merksema Naturamika rondo, K-do De Caluwe .

Tiu-ĉi nederlandlingve bonvenigas la (30) ĉeestantojn. Li opinias ke la lernado de Esperanto estas laŭdinda por la Natur-Amikoj sub duobla vidpunkto : Unue , al Naturamiko ,Esperanto ebligas intensan kontakton kun la loĝantaro de la fremdaj vizitotaj landoj, kaj due ankaŭ por socialisto, Esperanto estas efika propagandilo por liaj principoj. Antaŭ ol foriri li deziras sukcesplenan laboron al la grupo.

La prezidanto Willekens bedaŭras ke lia espero vidi inter la ĉeestantaro la malnovajn Merksemajn FLE-membrojn ne efektiviĝis. Li dediĉas kelkajn vortojn al la memoro de la kapabla , aktiva ,Merksema samideanino kies kruela morto kaŭze de milita teruro estis grava perdo por la movado. Sed ni ne malesperu , tiu-ĉi kunveno estu nova instigo .

K-do Foquet, kursgvidanto de la Merksema grupo, skizas la iradon de sia kurso kaj estas gratulata pro la jam atingitaj rezultatoj . Ankaŭ al K-do Beeckmans kiu raportas pri la kurso en Schoten la prezidanto deziras bonan sukceson.

Oni diskutas pri la kvalitoj de la diversaj lernolibroj (Facile lerni Esperanton, La Komencanto, Nia Lernolibro ) Estus dezirinde ke la diversaj grupoj de la Antverpena regiono uzu saman lernolibron. La elekto de tiu libro, kaj ankaŭ la propono pagi unu frankon por la prunteprenotaj libroj estos ĉefaj punktoj je la tagordo de la estrar- kaj kursgvidantoj kunveno , okazonta la 24an de Aprilo en Lamorinièrestraat 10, je la 8a.

En malonga parolado K-do Mortiers alvokis la gemembrojn kaj speciale la gejunulojn kaj gelernantojn al persisto en la studado kaj al regula ĉeestado de la kunvenoj por realigi intensan kunlaboron. Ankaŭ la marŝado malantaŭ la verda flago la unuan de majo, montru ke ni laboras kaj vivas.

Sekvas kelkaj informoj pri la "Informilo",la "Migranto" , la renkontiĝo en Kessel-Lo, kaj iom da libera diskutado dum ni regalas nin per bongusta kafo kun kuko tiel gastame donacata de la Merksemaj gastigantoj, kaj pro kiu la prezisanto kaj ni ĉiuj kore dankas.

Post kantado de "Fratoj al sun'..." la kunveno finiĝas. Ĝis revido la 9an de Majo en "De Hertog" en Deurne.

La protokolantino : St.De Weerd.

. . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . .

ALVOKO DE LA KOMITATO.

UNUA DE MAJO.

Ni ĉiuj partoprenu al la manifestacio .

Ni kunvenos : je la 10a horo . Frankrijklei, antaŭ la preĝejo de la jesuitoj .

LA SEKVONTA KUNVENO POR LA ANTVERPENAJ GRUPOJ OKAZOS :
SALONO "DE HERTOG" HERENTALSEBAAN 251 DEURNE
MERKREDON , LA 9an DE MAJO , JE LA 20a

# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro Antverpena. . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Redakcia adreso:Lamorinièrestraat 10 Antverpeno
Numero 15 1952 Junio

ESPERANTISTIO.

Preskaŭ nesenteble la vagonaro ekmoviĝis kaj mi estis sur vojo al Liego kie la anoj de SAT-amikaro kongresos. Mi ne rakontos ion pri la vojaĝo mem nek pri la pejzaĵo videbla per la vitroj de la kupeo. La unuaj sunradioj radiante promesis bonan veteron. Mi meditis pri la plezuro renkonti novajn amikojn, vidi kaj resaluti malnovajn kaj jen subite mi vidas france skribitajn surskriboj ĉe la kafeoj.

Tute nesenteble mi preterpasis la lingvolimon. De nun, la homoj parolas malsimilan lingvon ol en mia regiono. Nur la homoj. Naturo, bestoj sin komprenas sed la homoj, la supera estaĵo , dividis sin.

Baldaŭ mi alvenas en Liego kaj rapidas al la kongresejo . Jam multaj gekamaradoj estis kunaj. Grupetoj vigle interbabiladis, aliajn skribis kartojn aŭ interkonatiĝis.

Muzikistaro ludis belsonajn melodiojn kaj finante aĝigis la Esperon.

Tiam la kongreso komenciĝis. K-do Burnelle, prezidanto de la Organiza Komitato donis kelkajn informojn utilajn kaj trans - donis la martelon al la kongresa prezidanto.

Laŭvice oni prelegis la raportojn de la sekretarieco, administrado, kasisto, gazetservanto. Post kelkaj informoj rilate la raportojn oni aprobis unuanime la estraran agadon.

Venis tiam la tempo por la oficiala akce pto en la urbodomo.

Tiu solenaĵo estis vere ĝuinda pro la enhavo de la paroladoj. La anstataŭanta urbestro, senkulpiginte la provincestron kaj urbestron, diris ke li estis feliĉa bonvenigi la laboristajn esperantistojn en la Urbo. La laboristaj esperantistoj plene komprenas la veran signifon de la psikologia interkomprenigado nepre necesa por harmonio inter la popoloj kaj tial uzas kaj propagandas la kreintaĵon de Zamenhof. Li ankaŭ citas la patron de la laborista esperantismo, k-don Lanti.

K-ino Glodau respondas per bone elektitaj vortoj. Iom sprite ŝi rimarkigas ke iom da materiala subteno multe pli efikus ol ĉiuj eblaj asertoj de simpatio.

La prezidanto de F.L.E. ankaŭ parolis kelkajn vortojn (viglege) i.a. li diris ke por li la loko estis tute fremda , ke li ne komprenas ian vorton franca, sed ke pere de Esperanto li sentis sin kvazaŭ en familio, sen ia ĝeno.

Germana kamarado ankaŭ dankis dirante ke li raportos en sia lando pri la simpatio oficiale montrita de la urbestraro.

Per honorvino oni regalas la ĉeestantojn. La skabeno longe kaj amike parolis kun la kongreskomitatanoj.

Posttagmeze okazis vizito al la juĝejo; tio estas malnova palaco de la princ-episkopoj.Konstruaĵo vizintinda sed ŝimodoranta.

Post promenado al la ĉitadelo ni trafis denove la kongresejon.

La prezidanto de F.L.E. faris prelegon tre interesan. Li finis ja la 7a posttagmeze. Oni paŭzis tiam por vespermanĝi.

Mi profitis de la paŭzo por adiaŭi de ĉiuj novaj kaj malnovaj amikoj. Al multaj mi devis promesi viziti ilin.

Mi rapide iris al la staracidomo, kie jam atendis mian vagonaron. Anstataŭ ol dormeti, ĉar mi estis tre laca, mi nur sukcesis mediti pri la pasinta tago.

Kiel ĉiam, ne forgeseblaj impresoj skribiĝis en mia memoro. Ĉiam oni lernas ion pli. Oni aŭdas aliajn nekutimitajn voĉojn esprimantaj novajn ideojn. Oni revenas kun la certeco kaj konvinko ke alilandanoj fervore kaj nelacigeble laboras por nia komuna idealo. Maljunaj fortoj estas anstataŭitaj per junaj nehaltigeblaj fervoruloj kaj vole ne vole, oni sentas sin kaptita per la neklarigebla entusiasmo, kiu regas en ĉiuj renkontiĝoj internaciaj.

Pro.

. . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . .

Protokolo pri la intergrupa kunveno en Deurne, la 9an de Majo.

La 27 ĉeestantoj, eksidinte je kvarono post la oka ĉe la ronde ordigitaj tabloj, aŭskultas la bonvenigantajn vortojn de la prezidanto.

Tiu ĉi komprenigas al ni la regularon de la "kvizo" projektita de la gastigantoj. La ĉeestantaro konsistos el 4 grupoj po 6 personoj ; la grupoj devos respondi po 10 demandoj ; ĉiu ĝusta respondo valoros : unu poenton ; premio estos la libro "La Vojo Returne" de E.M. Remarque.

Gvidataj de K-do Bonte kun helpo de K-do De Groof kaj la prezidanto, la grupoj laŭvice respondas, kelkfoje ŝuldas la respondon al la enigmoj kaj demandoj pri historio, geografio ,literaturo k.t.p. Ne necesas diri ke la animstato dum tiu lerniga kaj samtempe amuza horeto estas tre vigla ; ankaŭ ridoj ofte ne forrestas. La kvara grupo fine akiras la premion kaj interkonsente decidas riĉigi la bibliotekon per ĝi por ke ĉiu partopreninto havu la okazon ĝin legi.

Oni favore protokolas nian partoprenon al la manifestacio de la unua de majo. La verda flago antaŭ la sufiĉe multnombra grupo en kiu kunmarŝis ankaŭ malnovaj konatuloj el Boom kaj Willebroeck altiris la atenton. Bedaŭrinde Volksgazet ne menciis nian federacion. Venontan jaron ni kunvenigu centon da kunirontoj kun pliaj flagoj. Ni funde uzu tiun senpagan sed ege efikan propagandilon !

Ni notu ke K-do Beeckmans metas je la dispono de korespondemaj naturamikoj, kovertojn je 4 frankoj po 10 . Nia libroservantoskribos al Amsterdamo por mendi "Plena Vortaro"jn kaj aliajn librojn; interesuloj kontaktu plej baldaŭ kun K-do De Bie, Geelhandplaats 19 Antverpeno.

Alproksimiĝas la deka, kelkaj esperantistaj Kantoj fermas la kunvenon ,

Ni revidos nin la 13an de Junio en Wilrijk

La protokolantino : St.De Weerd.

. . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . .

DO : NI ĈIUJ KUNVENOS LA 13an DE JUNIO EN WILRIJK
LA ADRESO ESTAS : HEISTRAAT 6 WILRIJK

= = = = = = = = = = = =

# E INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro Antverpena . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Redakcia adreso:Lamorinièrestraat 10 Antverpeno
Numero 16 1952 Julio

Libera estas tiu, kiu ne timas.

Ni Belgoj, ni estas normalaj ordinaraj homoj. Ni taksas nin mem ne tro altaj, kaj ankaŭ ne havas altan opinion pri aliaj popoloj. " Kiel vi fartas, vi demandas, ho, povus esti pli bone! Escepte la senlaboreco, jes, kaj kelkaj nuboj de rearmigado ... Tamen , tiu lasta ne taŭgas, ni tro multe jam spertis pri tiaj aferoj. Tiu aĉa politiko ! "

Iu elparolas la vorton " politiko" ... ĉiu pensas : plenigi siajn poŝojn. Jes ni estas realistoj . Ni kredu nenion kaj neniun .

En tia atmosfero ni vivas en nia lando. Kiu persono , gazeto aŭ revuo en la mondo ja donos al ni fidindan, ĝustan bildon ? Ne ekzistas kaj ne povas ekzisti. " Nenio estas tute vera, kaj eĉ ne tio. "

Ĉiu verko aŭ artikolo havas tendencon. Ĝi estas tro hela, tro nigra, tro flava, tro ruĝa, tro blua kaj eble alie. Se ni ŝatas esti informataj pri la situacio de scienco, kulturo , politiko, ekonomio ktp. en kiu ajn tempo kaj regiono, ni nepre ne devas nur legi la legaĵojn pri ĝi kun nia ŝatata tendenco , sed ankaŭ ĉerpi el aliaj fontoj.

Jen ekzemplo : Kelkaj el ni , esperantistoj, jam konas la revuon " El popola Ĉinio " . Ĝi belaspektas, kostas malmulte, lingve bone , donas informojn kaj bildojn el sia lando, tamen ... la tendenco ne plaĉas al ĉiu. La enhavo estas tro tio, tro tio ĉi. Jes, kompreneble , estas diferenco inter ilia situacio kaj nia. Sed, ĉu pro tio, tiuj informoj ne estas pli interesaj ?

Ni ja lernis Esperanton por havi facile kontakton kun aliaj popoloj en la mondo ! Eviti kontakton , ĉar vi timas la influojn montrus ĉi tie malfortecon de via ideologio.

Vi certe bedaŭras kun mi, ke estas tro malfacile havi Esperantan korespondanton en certaj landoj . Krom indiferenteco kaj poŝtaj malfacilaĵoj, ankaŭ plej multo da homoj ne estas skribemaj. " Morgaŭ mi skribos, ĉar nun mankas tempo , preta plumo, poŝtmarko ... kaj spirito. Escepte tio, la paperon kaj koverton mi eble trovus.

Se krom via malskribemo kaj la malfacilaĵoj al Esperanto en diversaj landoj, ankoraŭ venus la malintereson en la sorto de popoloj sub reĝimo kun ne ŝatata tendenco, baldaŭ forestos tute la ebleco akiri ion en Esperanto el tiuj landoj.

Tial, por helpi viajn gesamideanojn en malfavoraj cirkonstancoj, korespondu kaj montru vian intereson.

Tiel ankaŭ vi helpos plifirmigi tutmondan pacon.

E.S.

**Protokolo pri la intergrupa kunveno en Wilrijk, la 13 an de junio 1952 a.**

Kiam, iom post la oka, la Wilrijka prezidanto malfermas la kunsidon, la mallarĝa salono estas bone plenigita (26 personoj).

Donante diversajn detalojn pri la renkontiĝo de la Naturamikoj Esperantistoj en Kessel-Lo, la 28/29an de junio, li instigas la aŭtobusveturontojn al senprokrasta anoncado (prezo 65 fr.)

Bedaŭrinde ne ebligos montri la " normal" jugoslavan sonfilmon "Ni obei la akvojn" sed la filmo " La vivo de la lignoflosistoj" certe ankaŭ interesos la vidontojn. Per teatraĵo " Paco per Esperanto " ankaŭ la Hobokena grupo kontribuos al sukcesigo de la semajnfino .

La prezidanto Willekens raportas pri letero ricevita de Booma grupo kies membroj bedaŭras ke niaj partoprenintoj de la unua maja manifestacio, ne ĉiam parolis esperantlingve . Li esperas ke tiu letero estu instigo al plibonigo kaj samtempe okazo por kontakti kun tiu grupo. Ni aranĝu renkontiĝon , preferinde je ia dimanĉomateno , tiamaniere ke ni ankaŭ povu viziti ian brikbakejon aŭ alian vidindaĵon. Jen interesa programpunkto por la septembra monato.

La farota kontakto kun Meĥlenaj samideanoj ankaŭ estas priparolata.

Ĝis tie la ĝeneralaj sciindaĵoj . La vico estas nun al K-dino September kaj K-do Wolfs , gemembroj de la Wilrijka grupo , kiuj kun helpo de klaraj lumbildoj priskribas por ni la Nederlandan urbon "Valkenburgo" ,lokita meze de la Limburga monteta regiono. La pentrinda pejzaĝo, la rokdomoj, la komuna groto, la katakomboj kaj mezepokaj kasteloj certe alvokas al vizito . La bone prezentata parolado rikoltas ĉies aplaŭdon.

K-do Van Eynde nun transdonas 10 numeritajn skizojn ; la ĉeestantoj klarigu la montritajn bildojn. Kiam poste ni laŭtlegas niajn klarigojn kaj K-do Van Eynde donas la veran signifon de la desegnaĵoj , ofte ekkrioj kaj ridoj eksonas en la salono.

Kontentaj pri la pasita vespero ni diras ĝis revido en Hoboken la 8an de julio.

La protokolantino : St. De Weerd.

. . . . . . . . . . . . . . .

LA INTERGRUPA KUNVENO OKAZOS EN HOBOKEN (VOLKSHUIS) MARDON LA 8an DE JULIO 1952a JE LA 20a

=====================================================

**Ĉu vi deziras korespondi ?**

Ni elĉerpis kelkajn adresojn el "La Pacdefendanto" PLZEN - Ceĥoslovakio.

K-do Miroslav Kulisek , Palackého nam.17 Plzen , Ceĥoslovakio.
19 j.studento, pri ĉiuj temoj.
K-do Jan Lukos , tajloro , Stalinova tr.C.10, Plzen , Ceĥoslov.
pri ĉiuj temoj, poŝtkartoj ilustritaj kaj poŝtmarkoj.
K-do Ludvik Benes , Konevova 128 , Praha XI - Ceĥoslovakio
K-do Ludoviko Kosi , C S S S Ŝtenovice u Plzně Ceĥoslovakio
pri politiko kaj pac-movado.
K-do Maver Nicolov, Mavrov,str."Dimitar Blagoev" 9 Burgas.Bulgario
Interŝanĝi poŝtmarkoj kaj ilustritaj poŝtkartoj.
K-do Frantisek Novak Radinska 21 Plzen - Ceĥoslovakio
eksfervojisto pri lab.movado kaj paco kaj ilustritaj p.m.
Esperanto-rondeto en Plzen,konsistanta el 120 membroj,grupo de junularo kaj aparta infanrondeto korespondos pri ĉiuj temoj.
Skribu p.k.al K-dino Ludmila Ŝloufova kor;fako, Uslavska ul 51
Plzen - Ceĥoslovakio

# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro
Antverpena. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Redakcio adreso:Lamorinièrestraat 10 Antverpeno
Numero 17 1952 Aùgusto-Septembro .

PAROLU ESPERANTE .

La demando jam ofte stariĝis kial la esperantistoj kiam ili estas inter si ne pli volonte parolas sian lingvon.

Ni scias ke kiam ili estas en oficiala kunveno la uzado de la lingvo estas deviga, sed ni ankaù scias ke tuj post la fermo de la kunsido, la ĉeestantoj facilanime transiras al la pli flue parolebla gepatra lingvo.

Ne estas do mirinde ke, kiam la kamaradoj renkontiĝas en ne oficiala aù duonoficiala okazo, ekzemple en la Unua de Majo manifestacio, ili tuj post la kvazaù devigaj bonvendeziroj, preskaù forgesas ke ili estas esperantistoj kaj brue kaj laùtvoĉe porolas nur flandre, skandaligante tiamaniere tiujn el iliaj kamaradoj kiuj opinias, tute prave cetere, ke inter esperantistoj oni ĉiepre parolu esperante.

Ni iafoje aùdis la argumenton ke, kiam esperantistoj de sama lingvo estas inter si, la praktiko de la lingvo estas iom superflua, ĉar esperanto estu uzata nur inter malsamlingvanoj, la gepatra lingvo estante la natura ligilo inter ili , sed tiun argumenton ni tute ne povas pravigi.

Ekzistas tute unue, la propagando.

La eksterstarantoj devas sperti ke esperanto estas vivanta lingvo, ke ĝi estas facile parolebla kaj praktikebla, eĉ de laboristoj, ni diru , precipe de laboristoj.

Ne ekzistas pli taùga propagando por nia lingvo ol ĝia praktikado kaj uzado publika.

Kaj, due, kiamaniere fariĝos ni bonaj esperantistoj se ni ne profitus ĉiun eblan okazon por paroli la lingvon ?

Ĉar tute certe estas ke la plej bona, la nura maniero por perfektiĝi en la lingvo estas ĝia konstanta praktikado , kiu kutimigas niajn orelojn al la sonoj kaj nia lango al la elparolado de nia idiomo, samtempe plivastigante nian vorttrezoron.

Niaj kamaradoj profitu do ĉiujn eblajn okazojn por paroli sian lingvon, por paroligi siajn kunulojn en la kunvenoj , kaj uzante ĝin kiel eble plej dum publikaj okazoj .

Ili tiamaniere plivastigos siajn proprajn konojn kaj ili plezurigos tiujn kamaradojn kiuj deziras ne malprave , ke esperantistoj parolu esperante.

Praz.

-------------

Pro neantaùvidebla cirkonstanco la plej unua grupa kunveno de Antverpeno povos okazi nur la 25an de Septembro.

445535
265392

**PROTOKOLO PRI LA INTERGRUPA KUNVENO EN HOBOKEN -LA 8an DE JULIO 1952a**

Denove estas en la ĉarma Hobokena saloneto ke la gemembroj - nur 17 ĉi-tiun fojon) kolektiĝas por la intergrupa kunveno.

Malfermante la kunvenon K-do Spitaels tuj transdonas la parolvicon al K-do Van Eynde kiu detale protokolas pri la renkontiĝo en Kessel-Lo.

Favorita per bela vetero kaj multnombre ĉeestita ĝi, kiel pasintjare estis ege sukcesplena. La popoldancoj de la grupo el Kessel-Lo, la kantado, la de la Hobokena grupo prezentita teatraĵo kun la klara antaŭparolo, rikoltis merititan aplaŭdon.

Ankaŭ la montrado de la propagandefikaj filmoj kiel de la distra "Micky Mouse" kaj la bela promenado ravis la partoprenintojn.

Kvankam la vojaĝo men havis por kelkaj kamaradoj malpli plezurajn flankojn kiel ni povas konkludi el la pitoreska rakonto de K-do Van Eynde pri la malfeliĉa veturo de K-do Van Sitteren kaj el la sprite raportitaj travivaĵoj de K-do Spitaels, la semajnfino kun la Bruselanaj kaj Wilselabaj kamaradoj certe agrable impresis.

Niaj pensoj nun forlasas Kessel Lo-n kaj vagas al la malvarmega, ventkaj glaciriĉa Norda Eŭropo, kondukitaj tien de K-do De Block per lia bona laŭtlego de la novelo " Antaŭ la senfino " de la finlanda verkisto Jehu Bergh.

Jam alproksimiĝas la deka. Tiu ĉi estante la lasta intergrupa kunveno antaŭ la libertempa periodo, la prez. Willekens, konstatas ke resumo ni povas esti kontentaj pri la farita laboro : la interdistriktaj kunvenoj estis bone ĉeestitaj ; la kursoj efektiviĝis laŭ deziro ; oni jam spertas la progresojn faritajn de pluraj gekamaradoj ; la informilo danke al la sindona laboro de K-doj Bonte kaj De Groof regule atingas la membrojn. Ni dankas ĉiujn kiuj kunlaboras al tiu sukceso kaj antaŭ-vidas jam interesan kaj viglan grupvivon por la nova jaro ( vizito de kamaradinoj el Danlando kaj el la Nigra Arbaro).

Gis revido en Antverpeno (Ommeganckstrato) la 15an de Septembro.

St. d.W.

. . . . . . . . . . . . . .

NOTINDAJ DATOJ

La kamaradoj notu la sekvantajn datojn pri okazontaĵoj en nia movado :

La 5an de Septembro ; La Deurne Grupo denove kunvenos post la ferioj; en "De Hertog".

La 29an de Septembro , intergrupa kunveno en Antwerpen, Ommeganckstraat je la 8a vespere.

La 22an de Septembro , propaganda kunveno en Naturamika Domo, 39 Frankrijlei , prezentado de filmo kaj parolado flandralingve okaze de komenciĝo de esperanto kurso en Naturamika rondo, je la 8a vespere.

La 8an de Oktobro, malfermo de esperanto kurso en Naturamika Domo, je la 8a vespere, sub gvidado de K-do Mortiers.

La 17an de Oktobro, malfermo de esperanto kurso en "De Hertog" Deurne, je la 8a vespere.

NOTINDAJ ADRESOJ .

Niaj grupoj kunvenas je la 8a vespere :

| | | |
|---|---|---|
| Antwerpen | : Jaŭde | - Lamorinièrestraat 10 |
| Deurne | : Vendrede | - Herentalsebaan 251 " De Hertog " |
| Hoboken | : Marde | - Heidestraat 246 ĉe Kdo Van den Wyngaert |
| Merksem | : Lunde | - Bredabaan en Volkshuis |
| Schoten | : Marde | - St Cordulastraat en Volkshuis |
| Wilrijk | : Marde | - Heistraat en Volkshuis |

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

C 265392

# L' INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro Antverpena. . . . . . . . . . . . . . . .
Redakcia adreso: Lamorinièrestraat 10 Antverpeno
Numero 18 1958 Oktobro

S P O R T O .
------------

Ne temas pri ia definita speco de sporto, sed pri la ĝenerala esprimo : esenco, enhavo, signifo, kompreno, unuvorte, la vera koncepto de sporto.

En nia civilizita mondo, la popolo nerve streĉas la atenton pri sportaj okazantaĵoj. Preskaŭ ĉiuj interparoladoj, eĉ diskutoj rilatas al ĝi. La gazetoj senescepte, ĉu partiaj aŭ ne, interkonkurencas por disponi pli kaj pli da spaco de siaj organoj al la sporto.

La venkoj detale raportitaj estas samtempe tre objektive pritraktataj. Por la venontaj renkontoj, kampoj , konkuroj, tre prudente kaj zorge oni profetas.

Multege da personoj ŝajne nur vivas pro sia sporto pensante pri nenia alia flanko de la homa vivo. Kaj kompreneble ne malofte okazas hejmaj malinterkonsentoj, interkamaradaj kvereloj, eĉ bataloj pro fanatikeco.

Tiu fakto estas simpla realeco konstatebla ĉirkaŭ ni.

La herooj de la sporto, t.e. la venkintoj, estas glore laŭdataj, adorataj, dorlotataj. Plej altranguloj, princoj, episkopoj, ministroj kaj generaloj gratulas ilin okaze de ia venko.

Kompare al tio, kion signifas scienco, kulturo , analfabeco, militdangero, flugantaj pladoj. La provo starigi la unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo estas bagatelo.

Oni rajte povas demandi al si ĉu ne jam venis la tempo bremsi tiun animstaton.

Certe la sporto havas sian bonan flankon, kulturan kaj pacigan, sed la popola sportemo tamen ne fariĝu simila al histeria apatio.

Ĉiu nepre konsentas ke la popolo bezonas distradon sed ĉiama inklino al venko, merita aŭ ne, havas nenion komunan kun vera sporteco.

Inter niaj samideanoj estas multaj sportemuloj kaj pro tio ni ĝojas. Ili tamen pruvas ke krom la sporto, ekzistas ankoraŭ io alia al kio ili dediĉas iom da tempo.

Iu iam diris al mi ke Esperanto estas lia sporto. Tio ja donas ideon. Ĉu oni ne povus doni ian sportan aspekton al nia movado. Ekzemple konkurado inter la grupoj por atingi la plej bonajn rezultatojn ?

Ni povas proponi la ideon anstataŭ ol moki la redaktoron de ĉi-tiu artikoleto.

M.

. . . . . . . . . . . . . .
. . . . . . . . . . . . .

PROTOKOLO PRI LA PAROLADO DE INDONEZIA SAMIDEANINO , la 26an de Septembro 1952 a.

- - - - - - - - - - - - - - - -

Certe la 26a de septembro restos notinda tago en la kroniko de la antverpena Esperanta vivo.

En la salono "De Witte Leeuw" Sinjoro Jaumotte, kiel prezidanto de E K I, bonvenigante la indonezian paroladontinon, esprimas sian ĝojon pri la grandnombraj ĉeestantoj (pli ol 100) el la diversaj Esperanto grupoj (FLE ± 35).

La indonezianino,S-ino Rankajo Ch.Datoe Toemenggoeng donacas fruktkorbeton en la verda koloro de Esperanto kaj la koloroj de Indonezio (samtempe la antverpenaj) manfaritan de indoneziaj virinoj.

Ĉiam dezirinde konatiĝi kun aliaj partoj de la mondo, ŝi dum la kongresoj plene spertis ke Esperanto estas pli ol sola lingvo sed ke ĝi konstruas ponton de popolo al popolo. Per prelegoj ŝi volas veki intereson por ŝia bela lando, speciale por ties virinoj.

Tiuj ĉi apartenas al 3 tavoloj :

1) la virinoj en la kamparo, kies granda kvankam ne malklera amaso ( Indonezio estas precipe agrikultura landa) formas la spinan firmecon de la 2 aliaj grupoj.

2) la duonkleraj virinoj inter kiuj la instruistinoj, flegistinoj ktp.

3) la intelektulinoj al kiuj apartenis la granda " "Kartini" kiu antaŭ 60 jaroj batalis por havigi al ŝia popolo propran kulturon.

La vivo tie estas tre diferenca de tiu en la okcidentaj landoj. La "Minankabaŭoj" havas la matriarĥan sistemon. Tio signifas ke la patrino regas la familion kaj administras ĝiajn posedaĵojn. Estas la virino kiu elektas la edzon, kiu ĉiam restas nur gasto en la edzina domo kaj eĉ mortas ĉe sia patrino. Por daŭrigi sian genton , la patrino naskas infanojn kiuj ricevas ŝian nomon kaj kiujn ŝi zorge edukas. El tiu sekvas ke la indoneziaj virinoj kvankam dolĉanimaj estas energiaj kaj kapablas preni iniciativon. Fidelaj al siaj principoj ili kalkulas ne personan feliĉon sed nur la bonfarton de sia tuta gento.

Pri la Esperantismo en Indonezio la paroladantino rimarkigas ke ĝi estas juna movado kaj propaganda materialo estas tre dezirata. Pro la momento la diversaj grupoj tra la tuta lando nombras ± 800 membrojn.

La prezidanto Jaumotte ege dankas la paroladintinon. Denove fora angulo en la mondo malfermiĝis al ni dank'al Esperanto. Floroj kaj la libro"Antwerpen" en la nomo de la virinaj aŭskultintoj, esprimas nian simpation. S-o Jaumotte kaptas la okazon por instigi al pli komuna laboro. La tuta antverpena esperantistaro senescepte kunvenu minimume unu foje po jaro.Ni urĝu malrapide, intime interparolu pri tio. Espereble la "Beneluksa Kongreso" estos sukceso ne nur laŭ nombro sed ankaŭ laŭ spirito.

So Foquet aprobas kondiĉe ke la preteco montriĝos ĉiuflanke. So Jacobs per klaraj vortoj promesas sian helpon por starigi kaj fortigi la kunlaboradon.Ankaŭ S-ino Schoofs alparolas la ĉeestantaron por forigi la barojn en nia lando.

Post kelka interbabilado,kantinte "La verda Stelo"n kaj "La Espero"'n estas duona post la deka kiam la gekunvenintoj ekhejmeniras, ege kontentaj pri la vespero.

. . . . . . . . . . . .

MITULVESPERO : Laŭ peto de multaj mitulenglutigantoj okazos vendredon la 24an de oktobro je la 8a vespere en salono "De Hertog" Herentalsebaan 251 Deurne ; Mitulfesto.
Partopreno en la kostoj : Fr.10,- po persono.Sin anonci ĉe k-do Bonte De Francqueslei 8 Deurne antaŭ la 15a

# L E INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro Antverpena. . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Redakcia adreso:Lamorinièrestraat 10 Antverpeno
Numero 19 1952 Novembro


KORESPONDADO.

Multaj membroj niaj ŝatas korespondi. Sed tro ofte okazis , kiam ili skribis al adreso aperinta en iu ajn gazeto aŭ revuo, ke ili ne ricevis respondon.

Tio sendube senkuraĝigas ilin, precipe la novulojn.

Do estas nia tasko trovi kaj transdoni adresojn kun respondo garantita ( aŭ preskaŭ ).

Ĉi sube jam sekvas du :

Helene Killmer
Ernte Grund 27
Wupertal - Germanio

petas kelkajn adresojn por siaj grupanoj.

Ankaŭ la

Esperanta Korespond Klubo
260, Oka-Shinmachi
Hirakata City
Osaka - Japanio

pere de sia ĉefklubano S-ro Yoshitaka Ueda , garantias respondon.

Eble ke jam en la venonta numero de "Sennaciulo" aperos anonco mia.

Mi certe ricevos respondon kaj kunportos la ricevotajn leterojn al niaj monatkunvenoj.

Mi esperas ke niaj membroj trovos konvenajn korespondantojn en ĝi.

Sekr.

. . . . . . . . . . .
. . . . . . . . . .

PROTOKOLO PRI LA INTERRUPA KUNVENO DE LA 29a DE SEPTEMBRO 1952a

Estas en Antverpeno ke denove la gemembroj (± 20 ) rekunvenas post la feria monato.

Unue oni protokolas nian ĉeestadon je la prelego pri Indonezio, organizita de E.K.I. en salono "De Witte Leeuw", la 26an de Septembro.

La pritraktado de komunikaĵoj pri propagandiloj kaj kursoj en la diversaj grupoj inkluzive la daŭriga kurso en Frankrijlei ( ĉiusemajne je la 9a merkrede ) konsciigas nin pri la farenda laboro.

Koncerne niajn rilatojn kun la Naturamikoj oni decidas donaci 500 Fr. por la "Miliona akcio", ankaŭ la Boomaj Naturamikoj estas laboremaj, organizante propagandvesperon kun filmprezentado.

K-do Bovoj disdonas faldfolion pri Antverpeno , antaŭ nelonge eldonita de la trafikoficejo.

La de longe atendita " La Migranto" fine estas alveninta, post vera migrado el Aŭstrio; laŭ Oslo al Antverpeno, kiel informas nin K-do Van Eynde. Efektive, tiu-ĉi per brila kaj instrua rakontado protokolas al ni sian kongresoĉeestadon en Oslo kaj la kunigintan studvojaĝon.

Certe la travivaĵoj dum la vizitoj al la "Svenska Kogellager " la fabriko de peza akvo kaj la arĝent-minejo je Köngsberg, vekas ĉies intereson.

Por la proksima kunveno la Deurnanoj rezervas al ni ion specialan sed pri tio ni legu la Ĝeneralajn sciigojn. (por ne intermiksi la datojn !)

Stella De Weerd.

. . . . . . . . .

PROTOKOLO PRI LA MITULFESTO DE LA 24a DE OKTOBRO EN DEURNE.

---

Certe la gepartoprenintoj (+ 30) al la mitulfesto okazinta la 24an en Deurne, ne bedaŭras la pasintan vesperon.

Iom post la oka, la unuaj bongustaj mituloj aperis sur la tablojn; dank' al la helpemeco de kelkaj gekamaradoj, la mitulemuloj povis seninterrompe ĝui la ŝatatajn moluskojn , ĝis fine eĉ la plej malsatintaj frandemuloj ne plu kapablis engluti nur unu mituleton.

Restis ankoraŭ iom da tempo por amuza konkurso (laŭvice kvar membroj de konkursantaj grupoj transdonu frazon; laŭ la lastripetita frazo la poentoj estas kalkulataj)

Car kelkaj simpatiantoj ĉeestis, la konkurso estis organizita unue flandralingve, poste en Esperanto. Nur kun malmultaj poentoj la gajnintoj akiris la premiojn, ĉar kvankam la gekonkursanoj ege streĉis siajn fortojn la rezultatoj estis nur kripligitaj frazetoj, je la granda gajeco de la publiko.

Post merita gratulo al la Deurna grupo por la organizita vespero, oni promesis renkonti sin denove en Wilrijk kie atendos nin interesplena parolado de K-do Van Eynde pri lia feria vojaĝo.

Post kelkaj ĝeneralaj informoj, kuna kantado denove anoncis la fino de la kunveno.

Stella De Weerd.

LA SEKVONTA INTERGRUPA KUNVENO OKAZOS EN WILRIJK
VENDREDON , LA 21an DE NOVEMBRO
JE LA 20a HORO. EN LA POPOLDOMO , HEISTRAAT 6